# Kiel altiri pli da junaj membroj tra Eŭropo

SEMINARIO PRI AKTIVULA MATURIGO (AMO)

## AMO 77

POLLANDO, VROCLAVO

SEPTEMBRO 11, 2021, SABATE EKDE 16.00 CEST (14.00 UTC)

Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej

# Kialoj por la temo:

- Perdado de membroj en preskaŭ ĉiu signifa lando de Eŭropo. 14 el 15 el la plej signifaj landoj suferis membro-perdon. Grandparte tiu kontinua perdado okazas pro foraĝiĝo de la popolo, pli kaj pli el ili emas aŭ devas emeritiĝi el movada aktiveco.
- Ju pli aĝaj la membroj en Landa Asocio, des malpli ili kredeble povos krei projektojn allogaj por junuloj

Europejskie
Centrum
Edukacji
Międzykulturowej

AMO

# Landoj

## EŬROPO - membraro 2014-2020

Temas pri la Individuaj Membroj. Ordigo post la unua laŭ la elcentaĵo de perdo.

La du jaroj elektitaj, ĉar la influo de la Universala Kongreso malgrandas.

Fontoj: La oficialaj deklaroj en revuo *Esperanto kaj la Reta Oficejo.*

| Lando | 2014 | 2020 | Perdo |
|---|---|---|---|
| Hispanio | 115 | 134 | **+ 14 %** |
| Kroatio | 32 | 20 | 60 % |
| Svedio | 95 | 66 | 44 % |
| Rusio | 86 | 61 | 41 % |
| Italio | 134 | 102 | 31 % |
| Nederlando | 175 | 139 | 26 % |
| Litovio | 22 | 18 | 22 % |
| Hungary | 67 | 56 | 20 % |
| Belgium | 113 | 95 | 19 % |
| Finnlando | 90 | 78 | 15 % |
| Ukrainio | 37 | 33 | 12 % |
| Svislando | 83 | 74 | 12 % |
| Germanio | 424 | 387 | 10 % |
| Pollando | 89 | 82 | 9 % |
| Francio | 385 | 359 | 7 % |
| **Eŭropo*** | **1947** | **1704** | **14 %** |
| **Mondo** | **4966** | **4293** | **16 %** |

* Europo: Nur la 15 listigitaj landoj

La rezultoj ege dependas de la elektitaj jaroj

Ni vidas klarajn regionojn de plej abruptaj faloj:

1) Nordio. Baltio kaj Benelukso: SE, FI, LT, NL, BE
2) Centra kaj Orienta Europo: HR, RU, HU. UA, PL

# Junuloj tra la Eo-mondo

- Esploro pri po kvin landoj en diversaj kontinentoj:

| Kontinento | Membroj IM de UEA | Junaj membroj | Proporcio | Landoj |
|---|---|---|---|---|
| Afriko | 98 | 51 | 52 % | 5 |
| Ameriko Latina | 516 | 193 | 37 % | 5 |
| Eŭropo | 1058 | 106 | 10 % | 5 |
| Azio | 574 | 55 | 9 % | 6 |

La vera surprizo estas la rezulto por Azio – malpli da junuloj ol en Europo. Latinameriko bonas grandparte pro la hispanlingva kurso.

# Laulande (1)

| AFRIKO | Membroj IM de UEA | Junaj membroj | % junaj |
|---|---|---|---|
| Burundo | 43 | 30 | 70 % |
| Senegalo | 22 | 8 | 36 % |
| Togolando | 19 | 4 | 21 % |
| Tanzanio | 7 | 3 | 43 % |
| Ugando | 7 | 6 | 86 % |
| SUME | 98 | 51 | 52 % |

| AMERIKO | Membroj IM de UEA | Junaj membroj | % junaj |
|---|---|---|---|
| Brazilo | 285 | 57 | 20 % |
| Meksiko | 98 | 57 | 58 % |
| Kolombio | 79 | 57 | 72 % |
| Argentino | 37 | 14 | 38 % |
| Ĉilio | 17 | 8 | 47 % |
| SUME | 516 | 193 | 37 % |

- Elektitaj po kvin landoj kun la plimulto de membroj.

# Laulande (2)

| EŬROPO | Membroj IM de UEA | Junaj membroj | % junaj |
|---|---|---|---|
| Germanio | 399 | 26 | 6.5 % |
| Francio | 339 | 28 | 8.3 % |
| Hispanio | 147 | 23 | 15.8 % |
| Italio | 101 | 11 | 10.9 % |
| Rusio | 72 | 18 | 25.0 % |
| SUME | 1085 | 106 | 10 % |

| AZIO | Membroj IM de UEA | Junaj membroj | % junaj |
|---|---|---|---|
| Japanio | 238 | 9 | 4 % |
| Ĉinio | 136 | 16 | 12 % |
| Koreio | 80 | 5 | 6 % |
| Israelo | 53 | 6 | 11 % |
| Vjetnamio | 35 | 13 | 37 % |
| Irano | 32 | 6 | 19 % |
| SUME | 1085 | 106 | 9 % |

- Azio: Bezonata junigo en Cinio, Koreio kaj Japanio.
- Modelo: Filipinoj, Indonezio.

# Fontoj por la seminario

- La enkonduko por AMO 72 ‘Ŝtopi la digojn’
- La enkonduko por AMO 69 pri nordia renovigo
- La rezultoj el AMO 74 en la virtuala kongreso de UEA
- <Landa Parad’> por Eŭropo: aktuala ĝis majo 2021.
- La principaro de Frostavallen, Svedio (1956).
- AMO-seminarioj kun parencaj temoj: AMO 17 en Eger, Hungario en dec. 2015, AMO 24 en Odense, Danlando en majo 2016, AMO 51 en Gherla, Rumanio en sept. 2018 kaj AMO 69 en Oslo, Norvegio en nov. 2020.

# rPostsekvoj por la seminario AMO 74

- AMO 77 en Wroclavo, Pollando (sept. 11) kun temo: "Kiel amase prezenti Esperanton al junuloj kaj pliaĝuloj"
- Pli forta agado de la Eŭropa Komisiono – ne okazis
- Pli forta engaĝigo de TEJO kaj aktivuloj pri retaj informejoj kaj kursaroj – ne okazis
- Rejunigoj de la membraro de kelkaj Fakaj Asocioj.

Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej

# La vojoj al rejunigo

- Delonge ni komprenas la triŝtupan aliron por tiri novajn esperantistojn:
- Variaj nomoj estas por tio:
  - Informado, Edukado, Utiligo
  - Konsciigo, Kapabligo, Komunumo
- Ni devas havi solvojn por ĉiuj el tiuj paŝoj, pretaj en multaj lingvoj, per allogaj liver-sistemoj, kiuj celas altiri pli junajn personojn. Eŭropo estas aparte multlingva (almenaŭ kompare al la Norda Ameriko kaj la grandaj landoj de Azio)
- Sed abundas rimedoj por informado, instruado kaj utiligo en multaj lingvoj de la kontinento.

# Por informado

- Ĉiu lando nomumu homon por membri en la grupo ZPI de UEA (Zorgantoj pri Informado).
- Pli bone konu la eblojn de <Esperanto.net> kaj <Lernu.net>.
- Sekvu la ekzemplojn de la retejoj de aktivaj Landaj Asocioj por doni bonajn informojn pri Esperanto (ĉe pluraj landoj la ĉefa celo de la retejo estas nacilingva informado).
- Evoluigu manierojn tiri informitojn al plia agado.

# Por instruado

- UEA proponu por Eŭropo iom similan al la hispanlingva kurso kiu ege sukcesis en Latinameriko en 2020. La Eŭropa solvo tamen ne havas la lukson de unu supernacia lingvo. Kursfinintoj havu vojon al membreco en UEA.
- Pli intense eluzu la riĉan materialon por instruistoj ĉe <edukado.net>
- Pli intense uzu <lernu.net> kiu multlingve proponas informojn kaj kursojn.
- Fortigu la ligojn inter la Landa Asocio de UEA kaj la sekcio de ILEI.

# Por utiligo

- Prezentu internaciajn retejojn, por emfazi la internaciecon de la lingvo.
- Pli forte proponu la revuon *Juna amiko* kaj la retejon <Facila.org> por firmigi la lingvokonon.
- Uzo de la Eventa Servo por sproni partoprenon en internaciaj eventoj.
- Uzo de la rimedoj kaj projektoj de TEJO por doni novajn uzeblojn por varbitoj.

# Rekomendoj al UEA (1)

- Restarigu la Landan Asocion en Estonio, Islando, Portugalio, Makedonio Norda aŭ subtenu alternativajn solvojn.
- Fortigu la ligojn inter la Landa Asocio de UEA kaj la Sekcio de ILEI kaj la landaj aktivuloj de pliaj kernaj Fakaj Asocioj.
- Donu pli fortan elstarigon por la aliĝintaj Fakaj Asocioj.
- Aktive subtenu projektojn por pli bone konigi Esperanton inter pli junaj personoj, pere de plurlingvaj rimedoj.
- Aktive subtenu projektojn, kiuj proponas kursojn en Esperanto en la lingvoj de Eŭropo.

# Rekomendoj al UEA (2)

- Trovu enlandajn agemulojn kaj subtenu ilin.
- Pli klare elstarigu la atingojn de la fortaj landaj asocioj.
- Trovu la landojn kun la plej malekvilibra aĝstrukturo.
- Trovu la landojn, kiuj pleje bezonas helpon de UEA, TEJO kaj aliaj, kie la Landa Asocio estas malforta aŭ velkinta.
- Kreu sistemon por rangigi la aktivecon de Landaj Asocioj, simila al tiu uzata en TEJO (Kodejo).

# Rekomendoj al TEJO

- TEJO devas en sia retejo pri sekcioj noti la aktualan staton de la sekcioj.
- Retejo: https //www.tejo.org/en/pri-ni/strukturo/landaj-sekcioj/
- TEJO havas ege laŭdindan skemon por noti la aktivecan nivelon de siaj sekcioj: Tre aktiva, Aktiva, Kreskanta, Funkcianta kaj Ne plu funkcianta.
- Sed tiuj kriterioj ne estas aplikataj kaj montrataj. La tabelo havas eĉ kolonon "Aktiveco" sed ĝi malplenas.
- Se tio okazus, TEJO devus konfesi, ke preskaŭ triono de siaj eŭropaj sekcioj de jaroj ne funkcias.

# Rekomendoj al ILEI (instruistoj)

- Restarigu Sekcion en Finnlando kaj Norvegio.
- Fortigu la instruistaron en Aŭstrio, Francio, Portugalio, Rumanio kaj aliaj.
- Engaĝiĝu kun kursaj projektoj celataj al eŭropanoj. Memoru, ke eĉ se mankas kurso por ĉiu lingvo-grupo, multaj homoj povas eklerni Esperanton pere de kurso en alia lingvo, kiun ili regas.
- Spronu universitatan laboron tra la kontinento. Kunlaboru kun IFEF pri Pardubice (CZ), ekspluatu ligojn kun Ukrainio (Lucyk), Nederlando (Amsterdamo) kaj aliaj.

# Rekomendoj al IKEF (ekonomio)

- Fortigu la aktivecon tra Eŭropo. Nuntempe estas filio nur en Pollando, sed sen retadreso.
- Akiru retadreson por la pola filio.
- Sekvu evoluojn en Bulgario kaj interesiĝon el Hungario.
- Konstatu, ke la Centra Eŭropo estas fekunda tereno por komerca Eo-agado.

IKEF Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio

# Rekomendoj al Landaj Asocioj

- LA evoluigu kunvenojn kaj eventojn allogaj al pli junaj homoj kiuj pasis tra la stadioj de informado kaj lingvolernado.
- Konigu en la membraro la internaciajn proponojn por instruado kaj informado.
- Uzu la servon de UEA <eventa servo> por logi internacian publikon al la eventoj.

Europejskie Centrum Edukacji Międzykulturowej

# Validaj kritikoj al la tradiciaj modeloj

- Necesas diskuti kaj evoluigi novajn modelojn por landa agado, kiuj evitas la tradician strukturon de landaj asocioj/sekcioj. Pledantoj por tio aŭdiĝas de junuloj en Svedio kaj la membroj en Estonio kaj aliaj. Kiu ŝatas la nunan modelon, sekvu tion. Sed por aliaj kazoj, necesas elpensi alternativajn organizajn formojn. Gravaj demandoj:
  - Ĉu interesiĝintoj havos manierojn scii pri Esperanto?
  - Ĉu tiuj potencialaj esperantistoj trovos vojon al kursoj kaj lernebloj?
  - Ĉu ekzistos manieroj tiri ilin en la komunumon?
  - Ĉu la cetera mondo havas manierojn ekscii pri la enlandaj progresoj?

# Konkludoj

- La partoprenantoj de AMO 77 konsciu pri la daŭra urĝo de la demando.
- La AM-antoj proponu sian kunlaboron al la Eŭropa kaj Azia Komisionoj de UEA
- TEJO havas apartajn kapablojn, nepre sed malfacile ĉerpindajn

